

21-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj

La partopreno estas senpaga kaj ne necesas plenigi aliĝilon. La aranĝo okazos ĉe la platformo [Zoom](#). Meeting ID entajpi la numeron 990 029 2000, kaj se necesas uzi pasvorton, ĝi estas bja2020. Partoprenu en la 21-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, tradicia renkontiĝo de esperantistoj en la nastkiĝurbo de LLZ! Ĝi okazos en la tagoj 11-13 de decembro, ĉi-foje en reta formo. Kelkajn teknikajn konsilojn vi trovos ĉe [ĉi tiu paĝo](#).

Programo

Vendredo, la 11-a de decembro

- **17h00** Malfermo. Resumo de la 10-a literatura konkurso *Esperanto ligas homojn. Pandemio: neĉiutaga ĉiutageco*. Prezento de la premiitaj verkoj kaj *Bjalistokaj Kajeroj* – kolekto de ĉiuj konkursaj tekstoj. La konkurso okazas sub alta protektado de la urbestro de Bjalistoko.
- **17h30** (pollingve) Prezentaĵo de la 105-a numero de la [kvaronjara revuo Karta](#), grandparte dediĉita al la temo *Lingvo kontraŭ malamo. Esperanto 1887–2020*. La gastoj estas Jeremi Galdamez – la elektinto de la tekstoj.
- **18h00** (pollingve) Zosia Dzierżawska, la aŭtorino de ilustraĵoj por la libro [Doktoro Esperanto kaj la lingvo de espero](#), parolos pri la laboro super la eldonaĵo.
- **18h30** Koncerto de Frey-Lech Trio, Młoda FolkKREW kaj Uku-Donaco Bjalistoko realtempe el Centro Ludoviko Zamenhof.

Sabato, la 12-a de decembro

- Serio de prelegoj:
 - **10h00** Adam Wilkus: Esperantaj Tagoj de Krakovo en la tempo de kronviruso
 - **10h30** Małgorzata Komarnicka: Aktiveco de Eŭropa Centro de Interkultura Edukado
 - **11h00** Alexandra Paz: Novkristanoj en norda Portugalio
 - **11h30** Prezento de volontulado en Tuluzo
 - **12h00** Nina Pietuchowska: Bjalistoko en la 19-a kaj 20-a jarcentoj en la kunteksto de multkultureco
 - **13h00** Flormetado al la monumento de LLZ en Bjalistoko.
- **14h00** Koncerto de Tim Gallego realtempe el Berlino. La nova Esperanta stelulo, kolombia esperantisto, muzikisto kaj verkisto prezentos siajn freŝajn kantojn.
- Serio de prelegoj 2:
 - **15h00** Ilona Koutny: Universitata instruado de Esperanto kaj Interlingvistika Simpozio
 - **15h40** Jagoda Greger: Filmo pri Perkuno. Esperanto sur la strando en Sopoto
 - **16h00** Szilva Szabolcs: Prezento de la lernolibro *Pri kio temas?*
 - **16h30** Paŭzo
 - **17h00** Rafał Darasz: Historio de la Esperanta movado en Ĉinio
 - **17h30** Projektoj de Erasmus+ en la Esperanto-movado
 - **18h00** Ines Kahin: Kvizo pri lingvoj de la mondo
- **18h45** Paweł Fischer-Kotowski: [Prezento de Esperantisto de la Jaro 2020](#)
- **19h00** Koncerto de Kajto realtempe el Nederlando.

Dimanĉo, la 13-a de decembro

- **10h30**: Virtuala ekskurso al Supraśl.
- **12h00**: Trejnado de trejnistoj kadre de la programo Erasmus+.

Bjalistoka Esperanto-Societo organizas la renkontiĝon kun subteno kaj kunlaboro de Bjalistoka Kulturcentro / Centro Ludoviko Zamenhof kaj Podlaŝia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko.

La organizantoj havas la rajton ŝanĝi la programon. Ĉi tiu projekto estas realigita kun financa subteno de Eŭropa Komisiono. La projekto aŭ la eldonaĵo prezentas nur la vidpunkton de ĝia aŭtoro kaj Eŭropa Komisiono ne respondecas pri ĝia enhavo.